# ESPERANTA FINNLANDO

1970 numero 7 A oktobro



aŭtuno estas la griza sezono. oni tre volonte restas inter la protektantaj muroj de la hejmo. Sed same protekta estas la atmosfero en amika rondo. speciale ni volas instigi niajn legantojn al formado de stud-kluboj. ni sendis antaŭ mallonga tempo specialan studrondo-numeron de la finnlingva esperanta finnlando ĝi donas, espereble bonajn konsilojn. poste eble la nombro de laborantaj grupoj interne de nia movado kreskos, tiel ke la malgranda izolita grupo de nunaj uzantoj de esperanto fariĝas vera internacia popolo.

# BRITA KONSILANTARO AGNOSKAS LA VERON

En EF aperas malmulta esperanto-propagando (ni esperas). Tio estas intenca. Se vi scipovas legi EF-on, tio verŝajne signifas, ke vi konvinkiĝis pri la meritoj de esperanto.

Sed multaj esperantistoj iam kaj iam havas malagrablan sperton renkonti maltoleremajn kontraŭulojn de nia lingo. Kaj ofte, unu el la plej malfacile respondeblaj argumentoj de tiaj homoj estas: ”Ni jam havas la anglan lingvon, do kial ni bezonas esperanton? ”

Jen al nia helpo en tiu tikla demando venas – kio alia ol la ”Brita Konsilantaro” (British Council)! La Brita Konsilantaro ŝajne ne plu estas certa pri la brila estonto de la angla lingvo. Ĝia lasta jarraporto estas ĉio alia ol esperiga por la amikoj de la angla lingvo.

Jen mallonga resumo de tiu jarraporto, fare de ”Guardian”, unu el la plej altkvalitaj ĵurnaloj de Anglio;

”Ĉu neniu konkuranto? (jarraporto de British Council)

La angla lingvo kiel dua lingvo komencas dispeciĝi en kelkaj landoj, iom simile kiel la latino disiĝis en latinidajn lingvojn dum la frua Mezepoko – diris la Brita Konsilantaro en sia hodiaŭ eldonita jarraporto.

”Kaj lingvo ne povas esti tute neŭtrala,” agnoskas la konsilantaro. ”Brita instruisto de la angla lingvo nepre instruas ankaŭ pri Britio”. (”... En kelkaj landoj la angla lingvo kunportas la malamon de la kolonia regado...” aldonas ”Daily Telegraph” en artikolo pri la sama jarraporto.)

Sed hindaj instruistoj kaj iliaj nigeriaj studentoj en Norda Nigerio ne komprenas la anglan lingvon unu de la alia; en Okcidenta Bengalo, Kerala, kaj aliaj hindaj regionoj troviĝas reciproke nekompreneblaj dialektoj de la angla lingvo. Kaj dialektoj jam fariĝis apartaj lingvoj ĉe la kreoloj en la karibea regiono kaj la piĝino-parolantoj de Okcidenta Afriko kaj Malproksima Oriento.

”Senĉesaj klopodoj estos bezonataj, teni la dualingvajn variaĵojn de la angla lingvo en la limoj de interkompreneble”, diras la jarraporto.

Ja jarraporto ne laŭvorte postulas de la registaro pli altajn subvenciojn por fari tiun ĉi laboron. Ĝi asertas tamen, ke la subvencio de 126 470 000 fmk por la venonta jaro – kvankam ĝi superos la ĉi-jaran subvencion je 4 490 000 fmk – signifas ”proksimume kvinprocentan malpliiĝon laŭ kelkaj faktaj rilatoj, se oni kuntaksas la kreskantajn kostojn”.

El la ĉi-jara subvencio, 55 milionoj da markoj estas uzitaj por subteni centrojn kaj subvencii instruistojn en 83 landoj, kie 84,364 homoj studis la anglan lingvon. La plej granda unuopa nombro de lernantoj troviĝis en Brazilo: 16,066”.

Guardian, 27-a de novembro, 1969
Citita de ”The British Esperantist”





BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL
dz/91

# KOMENTOJ

1/ La ĉi-supraj ne estas la nuraj argumentoj, uzeblaj kontraŭ la angla lingvo. Sed ilia komenca fonto estas la Brita Konsilantaro. Tial oni povas citi ilin kiel validajn argumentojn.

2/ Multekosta afero estas la angla lingvo. Bedaŭrinde, multaj homoj, kiuj fervore subtenas la anglan lingvon por internacia uzo, ne scias pri tio: ili naive kredas, ke la angla lingvo fariĝis ŝatata nur dank'al sia propra merito, sen ia ajn monhelpo. La ĉi-supra artikolo montras, kiom da mono la Brita Konsilantaro elspezas dum nur unu jaro por antaŭenigi sian lingvon.

Ford-Fondumo uzas eĉ pli da mono por tiu celo – verŝajne multoble pli – ol la Brita Konsilantaro.

3/ La angla lingvo dispeciĝas nur inter homoj, kiuj uzas ĝin kiel duan lingvon. Estas vane aserti, ekzemple, ke la brita kaj usona lingvoj plu disiĝas. Male, ili fariĝas pli similaj, dank' al pliiĝantaj vojaĝado, radio- kaj televidprogramoj, interŝanĝo de literaturo, ktp.

Tute alia estas la situacio en la antaŭaj kolonioj de Britio. La "dece parolata" angla lingvo estas preskaŭ monopolio de malgranda rondo de regantoj kaj edukitaj homoj (Gowon, Ogukwu, ktp.). Ordinaraj homoj en tiuj landoj ne havas monon vojaĝi, aĉeti televidaparatojn kaj poŝlibrojn. Multaj ne scipovas legi. Rezulte, la anglaj piĝinoj pli kaj pli disiĝas.

Por riĉigi la homojn, oni devas eduki ilin. En la plej multaj antaŭaj kolonioj la edukado ne estas senpaga, ĉar la landoj ne estas sufiĉe prosperaj proponi tian servon al siaj enloĝantoj. Tial la enloĝantoj bezonas monon, kiun ili ne havas, por edukiĝi. Nur la edukado povas halti la kreskantan abismon inter la piĝinoparolantaj homoj kaj la regantoj (el kiuj kelkan jam scipovas la anglan lingvon pli bone ol ili scipovas siajn gepatrajn lingvojn). Sed la regantoj (almenaŭ subkonscie) malemas fordoni sian atingitan pozicion de kultura supereco. Dume, la piĝinoj jam fariĝis kutimaj kaj plu evoluas dise de la angla lingvo, kaj dise unu de la alia. Ili estos malfacile forigeblaj. La rezulta estas ensorĉita cirklo.

La Brita Konsilantaro kompreneble volas pli da mono por eliri sian ensorĉitan cirklon. Tial ĝi eldonis sian malfavoran jarraporton (ne por plaĉi al ni kaj aliaj kontrauuloj de la angla lingvo). Eble, ili ankau deziras pli bone konkuri kontrau Ford-Fondumo, kiu faras similar laboron en la samaj regionoj.

Sed ĉu la milionoj de Brita Konsilantaro kaj la miliardoj de la Ford-Fondumo plu efikos?



EĤOJ DE ISORANTA

En septembra Informilo de Turkuanoj "Verdaĵo" ankau raportis pri tiu ĉi sukcesa internacia kompadejo sed kritikis la troecon de programeroj dum la kampadejo. Nia observanto (vidu la antauan numeron de EF) skribas tial jene:

Via kritiko estus prava, se estus estinta ia devigo ĉeesti ĉiun programeron. Mi kredas kaj esperas, ke oni ne trudis iun senton de devo en tiu rilato. Almenau mi facile rezistis ian tian.

Sed por kelkaj, kiuj loĝas en izolaj lokoj, tia kampadejo estas preskau la nura ŝanco dum la jaro ricevi kompetentan kan personan instruadon. Por tiaj homoj, ju pli da instruado des pli bone. Ili venis al la kampadejo precipe por tio.




# INVITO al KUNLABORO

Ni Esperas, ke vi jam konas nian tutmondan kampanjon, por esperantigi la Skoltan Movadon.

Nia kampanjo jam donis kontentigajn rezultojn.

Se vi jam kunlaboras, ni petas al vi daurigi viajn klopodojn.

Se vi ne jam kunlaboras, ni urĝe invitas vin partopreni en nia tutmonda laboro.

Kiam vi ne konas la skoltan movadon, vi sube trovos informojn pri ĝi.

Ni ankau donas konsilojn, kies utilo jam pruviĝis.

Tial ĉiu povos partopreni en nia agado, kiu nepre estu daurigata, por ke la nunaj sukcesoj ne perdiĝu.

Vi partoprenos en BONE PLANITA, ZORGE GVIDATA, TUTMONDA agado.

La Kialo.

La Skolta Movado bezonas nian lingvon por siaj problemoj.

La Esperanto Movado bezonas junulojn por fortiĝi.

La tempo por nia agado nun estas matura.

Generala Ideo.

Ĉar la kondiĉoj kaj eblecoj povas esti tre diferencaj, ĉiu laboru lau propraj ideoj, kapablecoj kaj eblecoj.

Kiam vi sekvas niajn konsilojn ni tamen havos tutmondan, harmonian, fruktodonan agadon.

Principo.

Ni ne iru kiel almoz-petantoj.

Kontraue ni proponas al la skoltaro taugan helpilon, por solvi la lingvan problemon.

Se ili ne akceptas ĝin, ili grave malprofitas!

Celoj.

Ni menciu praktikajn celojn kiel:

La Tutmonda Skolta Jamboreo en ĉiu kvara jaro (1971 Tokio)

La Internacia Skolta Jaro (Speciale en Europo, 1972)

Metodo

Klopodu konatiĝi kun skolta klubo en via ĉirkauaĵo.

Proponu al ili kunlaboron en ĉiaj internaciaj aranĝoj, prelegojn pri aliaj landoj, rakontojn pri vojaĝoj, helpon ĉe ekspozicioj, instruon ĉe kursoj.

Eble vi vizitis la landon de la ĵamboreo,

faris lumbildojn au filmon, kiujn vi povas montri.

Proponu planojn por la semajno de Internacia Amikeco.

Verku mallongan artikolon por skolta gazeto.

Donacu al ili unu ekz. de lernolibro kiel signo de frateco, pro la komunaj idealoj de ambau movadoj.

...

## Vana laboro... ne ekzistas.

Komprenu: nia solvo por la lingva problemo estas nekompreneble simpla!

Tial estas normala afero, se oni ne tuj akceptas viajn proponojn. Nek ĉangreniĝu, nek koleriĝu, sed iom poste daurigu viajn klopodojn.

## Skoltoj estas praktikemaj.

Ne parolu pri nebulaj idealoj.

Lau la statutoj la Skolta Movado volas esti "Internacia Frataro" kaj ili honeste klopodas nuntempe tion esti.

Ne necesas paroladi pri tio.

Rakontu pri praktikaj aferoj:

internaciaj tendaroj, reciprokaj vizitoj, korespondo, interŝanĝo de fotoj, filmoj, insignoj, kantoj, ludoj, spertoj, poŝtmarkoj...

## Finita laboro.

Vi ne jam estas preta, kiam la skoltoj interesiĝas pri Esperanto.

Eĉ ne, kiam ili lernis ĝin. Ili ankau devas lerni kiel uzi ĝin, ĝis nia lingvo havu certan lokon inter la diversaj programeroj de la skoltgrupo.

## Persono pli valoras ol papero.

Persona vizito pli valoras ol letero.

Letero pli valoras ol artikolo en gazeto.

Konata persono estas pli valora ol fremdulo.

Post kelkaj vizitoj vi mem estos konatulo!

## Gazet-artikoloj.

Bona artikolo povas helpi vin. Malbonaj artikoloj certe tre malhelpos!

Relegu: "Skoltoj estas praktikemaj"

Via celo ne estas: vendo de lernolibroj. Tio nur estas la komenciĝo.

Demandu vin:

* Ĉu la skolto facile povas aĉeti la libron? FACILE? Kie? Kiom ĝi kostas? Kiel li pagu?
* Kiel vi povas havigi al li personan kontakton? helpon? Al vi la adreslisto de kluboj, kaj membroj de la esp. asocio certe donos utilon.

## Kiel verki artikolojn?

* Stilo kaj amplekso de via artikolo estu en harmonio kun tiuj de la gazeto,
* Maŝine skribita, unuflanke de la papero, duobla distanco inter la linioj, larĝa marĝeno.
* Unu temo samtempe. Du mallongaj artikoloj pli valoras ol unu. Tro longaj artikoloj estas senvaloraj. Cetere: homoj estas forgesemaj!

## Kvar niveloj.

En la skolta movado estas kvar niveloj:

a) Lokaj kluboj, b) distriktoj, c) landaj asocioj kaj fine d) La Skolta Monda Oficejo en Ĝenevo, Svislando.

Je ĉiu nivelo prefere laboru la sama esperanta nivelo.

## Oni ne vendas en dezerto!


Por vendi oni bezonas aĉetantojn. Tiujn oni ne trovos hejme.

Tial: petu permeson por vendado, prelego, ekspozicio ktp en skoltaj tendaroj kaj kunvenoj.

## La Skoltaro mem helpas al vi.

En multaj sk.gazetoj nun estas artikoloj pri internacia kunlaboro. Ili ne estas kompletaj, sed donas al vi la eblecon por verki kompletigon. Restu afabla, kaj tuj agu!

Nacia reprezentanto en Finnlando S-ro Seppo Tella, studa adreso (vintre): Pieni Roobertink. 4-6 M 70, HELSINKI 13, tel. (90-) 666 707



# LA ROLO DE KLUBOBULTENOJ

Pri la fenomeno, ke fakte iuj sufiĉe viglaj esperanto kluboj iom regule aperigis apartajn informilojn por sia membraro, oni multe ŝanĝis opiniojn. Celite ĉefe por loka, limigita anonca kaj propaganda uzo ili aldone povis publikigi ankau variajn skribojn de diversnivelaj samideanoj. Tiel oni povis ĝuste per tiuj neluksaj, malmultekostaj avizoj fari siajn komecajn provojn en esperanta verkado. Pro la manko de mono ankau tiu ebleco ne daure ekzistis, ĉar plej ŝparemaj societanoj ne sufiĉe inda vidis tiun agadon. Aliflanke la legantoj evidente ne ĉiam komprenis niajn malfacilaĵojn, sed senkompate kritikis pro la nebela, simpla aspekto kaj malperfekta lingvicio. Koncerne la lingvon ekzistis ankau du grupoj: unu kiu preferis esperanton preskau ĉiam, alia tio, kio volis apreĉi nacian lingvon rilate al plejmulto, komencanta legantaro.

Verŝajne oni povus tamen facile trovi kompromison en lingva problemo: Ĝeneralajn informojn kaj plemulton de propaganda materialo oni publikigu nacilingve. Tio ja estas konsekvence ĝuste rilate al komencantoj au eblaj ne-esperantistaj legantoj. Kiam fervoraj esperantistoj preskau ĉiam k ĉie preferas esperanton, ili tute kompreneble deziras fari ankau esperantajn rakontojn. Ja ofte ekzistas neniu ebleco por esperanta konversacio en kluba sfero. Lautempe la skribada lerteco ankau evoluas kaj nia landa organo ricevos novajn fortojn por estontecco. Fakte ĵus amatoraj klubobultenoj nur donas necesan ekzercadon al skriboscio. Kompreneble niaj klubaj avizoj ne devus tre ŝveliĝi per esperanto rakontoj, au per diversa informa materialo. Ĉiutempe oni povas konstati, kiel ankau esperantista hejmo pleniĝas per diversa paperaĵo. Kolektiĝas jarkolektoj da kelkan esperanto ĵurnaloj, faskoj de eksterlandaj leteroj k bildkartoj. Aldone ioma kvanto da nacilingvaj ĵurnaloj k gazetoj kaj diversaj dokumentoj k prospektoj. Tro da papero, tro da rubaĵo... Embarasa situacio ĉe samideanoj.

En tiu rilato estas tre necese, ke la amplekso kaj formato de esperanto-ĵurnaloj serĉis modernajn, malvastajn formojn. Mi konsideras, ke al ni ne estas necese konkuri en pompeco kun luksaj nacilingvaj ĵurnaloj. Ili povas (kaj devas) konkuri kun aliaj samspecaj presaĵoj. Nacilingvaj esperanto-prospektoj ja estas ĉiam necesaj, sed ties faro estas kompreneble afero de plej eminentaj esperantistoj. La klubobultenoj konsistas nur unu apartan, amatoran sekcion ĉe ni.

A v o

# EI TAMPERE

Jam preskaŭ tradicie konservata kutimo fariĝis al iuj de ni la vizitado en esperanto-lecionoj de nia laborista instituto. Sub la fervora kaj sperta gvido de instruisto Noponen oni laŭvice povis novan studperiodon komenci. Per trafa informado de aktivuloj denove ankaŭ pluraj novaj gelernentoj aperis al ni. Cifoje troviĝis anoncilo pri Ekursoj sur murtabulo de faklernejo, en iuj liceoj, eĉ kolegia loĝejo de studentoj. Lecionoj en SAMPOLA-ĉambro 210, vendrede je la h. 18,30 kaj 20,00.

Klubvesperoj kaj studrondo de laborista esperanto societo "A N T A Ŭ E N" kolektiĝas nune en oficejo de Työväen Sivistysliitto, Pellavatehtaankatu 25, Voiman koulurak.pihaporras. Pri la nova studplano oni konsideras je la komenco de oktobro la kunvenvespero marde, komence je h. 18,15.

La temoj do troviĝas ankaŭ por plej evoluintaj esperantistoj. La informan liston vi laŭpete ricevos de societa sekretario E. R a s k u, KULJU. Pere li oni povas aboni ankaŭ Esperanta Finnlandon kaj aliajn esperantaĵojn. La listo je tiu celo trovebla dum niaj kunvenoj. Laŭ samideana devo ankaŭ vi elektu almenaŭ ion por vi.

# en Tapiola...




...okazis jam jarojn atendita vizio,- ekbrilis la verda stelo sur aŭtuna ĉielo de TAPIOLA.
Ĉu aŭtomate ? Tute ne.
Ŝaltis la stelon s-no Jouko Kujala, kiu ankaŭ donas la energion por daŭra funkciado de la ideo.

Rezulte de anonco en la loka gazeto, alvenis preskaŭ dudek personoj por aŭdi faktojn pri la lingvo internacia.

Post fundamentaj priklarigoj de s-roj Setälä kaj Milton, la iniciatintoj estis superŝutataj je demandoj de ĉeestantoj. Malgraŭ ke mankis konstanta instruejo, oni tuj decidis establi elementan kurson en Tapiola. Du unuajn fojojn la kursanoj kolektiĝis en privata hejmo, sed nun oni jam disponas ĉambron en Tapiolan Yhteiskoulu, Opintie 1, ĉiun sabaton j.h. 17.00

Laŭ informo de la gvidanto, s-no Kujala, fervoro al la studado, kaj la nivelo de la kursanoj (ĉ. 15 ), estas vere altaj,- eble jam post kelkaj monatoj ekestos en Tapiola konversacia klubo,...kiu scias

Eĉ la rektoro de la vespera mezlernejo (kvarcent stud.) "minacas" fondi apartan fakon por esperanto en sia lernejo.

Ni esperu favoran aŭspicion al la nova ido de Esperantujo. RS

# LONDONO



# ALVOKAS

EAF-karavanon al la 56-a Universala Kongreso de Esperanto al Londono arangos Raimo Strandén, Tapiola. Detalaj informoj aperos en tiu ĉi gazeto post la jarŝanĝiĝo.

## MERCERO

| | |
|---|---|
| **Brustinsignoj** (verda stelo) | |
| Pingloj etaj (Ø6 mm) | 2,50 |
| Butonoj kun literoj UEA | 2,50 |
| **Por aŭto aŭ fenestro** | |
| Algluiĝa papero (Ø60 mm) | 1,- |
| Sendkosto unuopa por ĉiuj | -,35 |
| **Diskoj** | |
| Prononcado de Esperanto, mag Gustafsson & Setälä | 5,- |
| Kiel lerni novan lingvon japana tre klara reprodukto de artikolo de Setälä | 2,50 |
| Antaŭen — kanto de Päivi Paunu kaj M. A. Numminen | 7,- |
| Sendkosto por la japana | 1,25 |
| -"- la aliaj | 2,- |
| **Aerleteroj** | |
| Iras per -,50 al ĉiuj landoj | |
| 25 ekz. kun sendkosto | 2,50 |
| 25 -"- en sama pakaĵo kun libroj | 1,75 |
| La prezoj valoras ĉe antaŭpago al la poŝta ĝirokonto 6564-7. Se la sumo estas enkasigota per la poŝto (pagoŝarĝo) alpago | -,35 |
| **Katalogoj de libroj'** | |
| La eldonaĵoj de Fondumo | -,- |
| Librolisto de UEA | -,50 |

FONDUMO ESPERANTO
IIRISLAHTI
ĜIROKONTO 6564-7

## LERNU ESPERANTON PERFEKTE!

Privilegia vojo al lingvoscio 4,25
Oportuna Vortaro 5,-
Esperanton kielioppi 5,-
Disko: Prononcado 5,-

Daŭrigo:
Mary kaj Sulo 1,-
Esperanto-kurso 1,-
Taglibro de Kongresano -,60
Baghy, La verda koro 5,-
Privat, Karlo 2,-

Por supera ekzerco:
Paŝoj al plena posedo 10,50
Esperanto — moderna lingvo 5,-
Zamenhof, Proverbaro 8,-

## EKSTERLANDAJ VERKOJ EN NIA STOKO

LERNO- KAJ LEGOLIBROJ

Daŭriga kurso post Cheh-kurso 9,40
Esperanto laŭ naturmetodo 35,-
La kummetitaj verboformoj 2,40
La esperanta konjugacio I-2 10,-
Proverbaro(Zamenhof) 8,-
Aventuroj de pioniro(Privat) 8,50
Interesa legaĵo 7,50
Karlo(Privat) 2,-
Paŝoj al plena posedo(Auld) 10,50

POEZIO

La hirundlibro (Toller) 4,50
Islandaj pravoĉoj 9,50
Norda naturo (H,Dresen) 8,-
Preĝo (Jung) 1,20
Simplaj floroj 6,50
Sveda poemaro 6,-

RAKONTOJ

Brilo de Fantomo(Thoraeus) 5,40
Forto de l'vero (Adi) 5,40
Freŝa mateno (Kritz) 9,0
Iu finna infanaĝo(Rasku) 2,50
Jaroj sur Tero (Sinha) 16,-
Maŝinmondo (Szatmári) 8,-
Mirinda eliksiro 8,-
Misteroj de l'vivo 2,90
Sub la signo de la verda stelo 4,70
Ŝipestro rakontas 6,-
Taglaboristoj (H.Kirk) 18,-
Taglibro de Anne Frank 12,-
Tartarin de Taraskono 7,50
Trifoje akurate jela 12 horo 6,-
Junaĝa verkaro (Privat) 6,50

DIVERSAĴOJ

Kredo,floroj,dinamito 8,50
Vivo de Gandhi (Privat) 10,50
Zamenhof,aŭtoro de E, 17,-
Nova testamento 5,-
Mistero de l'sango 4,50
Bildlibro pri bestoj 8,-
Mondpercepto de modernaj natursciencoj 12,-
Nederlando, nacio en okcidenta Eŭropo 7,-
Flugas kanto tra la mondo 8,-

FONDUMO ESPERANTO
IIRISLAHTI
ĜIROKONTO 6564-7

**ESPERANTA FINNLANDO** (fondita en 1918), ĉefredaktoro: Vilho Setälä
Redaktoro: Pentti Kinosmaa, poŝtfako 36, SALO, Finnlando
**Adreso:** Esperanta Finnlando, IIRISLAHTI. **Aperas** 9-foje jare. **Abonprezoj:** enlanda 5 mk, eksterlanda 6 mk (15 rpk); abonu prefere per la poŝta ĝirkonto 6915.
**Anoncprezoj:** tuta paĝo 100 mk, duona 50 mk, kvarona 25 mk; pli malgrandaj unukolonaj 0,35 mk/mm. — **Eldonas** Fondumo Esperanto.

meder - offset helsinki 1970

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL